WIKIPEDIA

Malaja lingvo

La **malaja lingvo** (malaje: *Bahasa Melayu*) estas parolata en Malajzio, kie la norma formo nomiĝas la **malajzia** (*Bahasa Malaysia*), kaj ankaŭ en Singapuro, Indonezio, Suda Tajlando kaj Brunejo.

Malaja lingvo	
Bahasa Melayu - بهاس ملايو	
Parolata en	Malajzio, Brunei, Singapuro, Indonezio, Suda Tajlando, Sudaj Filipinoj
Parolantoj	ĉa, 180 milionoj
Skribo	malaja alfabeto, Javia skribo, latina alfabeto
Oficiala statuso	
Reguligita de	Dewan Bahasa dan Pustaka, Dewan Bahasa dan Pustaka Brunei, Language and Book Development Agency
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	ms
ISO 639-2	
Bibliografia	may
Terminologia	msa
ISO 639-3	msa
SIL	msa
Glottolog	indo1326
Angla nomo	Malay
Franca nomo	malais

Enhavo

Gramatiko
- Vortfarado
- Afiksoj

Vidu ankaŭ

Gramatiko

En la malaja lingvo estas 4 vortospecoj: substantivoj, verboj, adjektivoj kaj partikuloj. Substantivoj kaj verboj povas esti bazaj radikoj aŭ pliofte derivataj de aliaj vortoj per diversaj afiksoj.

Vortfarado

La malaja lingvo estas aglutina lingvo, formanta novajn vortojn per tri metodoj: aldonado de afiksoj al la radiko, formado de kunmetitaj vortoj aŭ ripetado de vortoj aŭ partoj de vortoj.

Afiksoj

Vortoj-radikoj povas esti substantivoj aŭ verboj, kiuj povas esti afiksitaj por derivi novajn vortojn, ekzemple el *masak* (kuiri) oni formas *memasak* (kuiri), *memasakkan* (kuiri ion por), *dimasak* (esti kuirata), *pemasak* (kuiristo), *masakan* (manĝo, kuraĵo). Pluraj komencaj konsonantoj mutacias kiam prefiksoj aldoniĝas: sapu (viŝi) iĝas penyapu (ŝvabrilo); *panggil* (voki) iĝas *memanggil*, *tapis* (kribri) iĝas *menapis*.

Aliajn ekzemplojn de uzado de afiksoj oni povas vidi

- *ajar* = instrui
- *ajar**an*** = instruaĵoj
- ***bel**ajar* = lerni
- ***meng**ajar* = instrui
- ***di**ajar* = esti instruata (netranzitiva)

- ***di**ajar**kan*** = esti instruata (transitiva)
- ***mempel**ajar**i*** = studi
- ***dipel**ajar**i*** = esti studata
- ***pel**ajar* = lernanto
- ***peng**ajar* = instruisto
- ***pel**ajar**an*** = subjekto
- ***peng**ajar**an*** = leciono
- ***pembel**ajar**an*** = lernado
- ***ter**ajar* = instruita (okaze)
- ***terpel**ajar* = bonklerigita
- ***berpel**ajar**an*** = klerigita

Estas 4 tipoj de afiksoj, nome prefiksoj (*awalan*), sufiksoj (*akhiran*), konfiksoj (*apitan*) kaj infiksoj (*sisipan*). Tiuj afiksoj estas dividataj al substantivaj afiksoj, verbaj afiksoj kaj adjektivaj afiksoj.

Substantivaj afiksoj estas afiksoj, kiuj formas substantivojn el bazaj vortoj. Ekzemploj estas:

Tipo de afikso	Afikso	Baza vorto	Derivita vorto
Prefikso	pə(r)- ~ pəng-	*duduk* (sidi)	*penduduk* (loĝanto, loĝantaro)
	kə-	*hendak* (deziri)	*kehendak* (deziro)
	juru-	*wang* (mono)	*juruwang* (kasisto)
Infikso	‹əl›	*tunjuk* (indiki)	*telunjuk* (montro, komando)
	‹əm›	*kelut* (senorda)	*kemelut* (kaoso, krizo)
	‹ər›	*gigi* (dento)	*gerigi* (dentita klingo)
Sufikso	-an	*bangun* (veki, konstrui)	*bangunan* (konstruaĵo)
Konfikso	kə-...-an	*raja* (reĝo)	*kerajaan* (reĝlando)
	pə(r)-...-an pəng-...-an	*kerja* (laboro)	*pekerjaan* (okupo)

Vidu ankaŭ

- Indonezia lingvo

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Malaja_lingvo&oldid=6312339"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 03:48, 4 maj. 2018.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.